

Willi Eichler: *Eĉ vegetaranoj?* (1926)

Tiu ĉi eseo estis publikigita en sia esenca enhavo jam en la “Nelson-kajero” de *Junge Menschen* [Junaj homoj].¹ Ke ĝi aperas ankaŭ ĉi tie, okazas unue pro tio, ke multaj *ISK*-legantoj ne legas ankaŭ *Junge Menschen*, kaj krome pro tio, ke nia gazeto – estante socialisma batalgazeto, kiu plenumas la batalon kontraŭ la ekspluatado – estas devligita ekbatali ankaŭ kontraŭ la plej kruda el ĉiuj ekspluatadoj, kaj finfine pro tio, ke kelkaj *objetoj* aperintaj kontraŭ la eseo en *Junge Menschen* estas traktataj ĉi tie. – La redakcio

“Se la homo kreas tiom da sufero, kiun rajton li do havas plendi, kiam li mem suferas?”

ROMAIN ROLLAND

“La junular-liganoj estas frenezaj, ili vivas abstinence kaj estas *eĉ vegetaranoj*”, esprimis sin gvidanta membro de la Socialdemokrata Partio de Germanio okaze de interparolo pri la Internacia Junulara Ligo (IJB). “Ili estas *eĉ vegetaranoj*” – kiu ne aŭdas la malaprezon el tiuj vortoj; kiu ne vidas plastike la bedaŭran, kompatantan ŝultrolevon de la moderna politikisto antaŭ si, kiu ne imagas kiel oni vid-al-vide tiom grandajn taskojn, kiuj nun prezentiĝas en la mondo de homoj, sin fordediĉas al “marotoj” kiel vegetarismo kaj abstinenco.

Kaj tamen, la malapreza juĝo de tiu SPD-gvidanto pri la alkoholabstinenco renkontos kontraŭdirojn hodiaŭ eĉ jam ekster la movado por abstinenco. La ekkono de s-ro Kuhlo, la bierfareja sindiko, ke alkoholo “ĉiuepoke plenumis politikan mision” – nome, “trankviligi” la subprematojn – ĝojinde kreskas ankaŭ ĉe la subprematoj mem, kaj pro tio kreskas ankaŭ ĉe ili la strebado deĵeti de si tiun trankviligilon. La ekzisto de la Laborista Abstinencula Ligo estas pruvo pri tiu strebado.

Sed kiun rilaton la vegetara vivmaniero havas kun la batalo de la socialistoj?

Socialismo signifas *senekspluatan* socion – liberan de *ĉiu* ekspluatado. Ekspluatado diversmaniere eblas: la kapitalisto ekspluatas la proleton, tiu tre ofte sian edzinon kaj siajn infanojn; la eklezio staras apude kiel aliancano kaj helpas pere de la spirita ekspluatado, kiun ĝi praktikas, vivteni la hodiaŭan sistemon de socia ekspluatado. La komuna trajto de ĉiuj ĉi ekspluatmanieroj troviĝas en la malatento al la interesoj de aliaj vivaĵoj, en la atenco kontraŭ iliaj rajtoj – koncize dirite, en tio, ke ili estas misuzataj por personaj celoj surbaze de nura perfortrilato. Ke tia kontraŭrajta perfortrilato ekzistas inter la ekleziaj paŝtistoj kaj iliaj gregoj, inter kapitalistoj kaj proletoj kaj inter la imperiismaj ŝtatoj kaj iliaj kolonioj, preskaŭ ĉiuj pensantaj homoj nuntempe koncedos. Sed kiu pensas pri tio, kian gigantan ekspluatadon prezentas la murdo de sendanĝeraj bestoj nur por havigi al ni palatotiklon per ilia viando?

Ekspluatado?, mi aŭdas miajn kamaradojn mirigite voki – kaj jam ni estas meze de disputo pri la “maroto”.

Ni rememoru, kion ni nomis ekspluatado: arbitra atenco kontraŭ interesoj por personaj celoj. Sed, kelkaj demandas, ĉu bestoj havas interesojn? La respondo povas vortumiĝi nur: Rigardu la bestojn. Kiu iam observis bestojn, scias, ke ili havas interesojn; ĉar la bestoj ja vere havas la eblon unusignife konigi al ni siajn interesojn. Kvankam mankas al ili la lingvo, kio do sekvas el tio, krom tio, ke ili ne povas mensogi al ni?

Iro al buĉejo jam sufiĉe instruas nin: jam de malproksime ni konatiĝas kun unu intereso de la buĉoferotoj; ĉar lamenta blekado kaj kriado elperfidas, ke neniu eĉ pripensas kvietigi la malsaton de

¹ Ni atentigas ankaŭ pri la aŭgusta numero de *Junge Menschen*, dediĉita ĉefenhavo al la temo “vegetarismo”. Iom da fakta materialo, kiu ne povas esti prilaborita ĉi tie, estas tie entenata. Ni rekomendas al niaj legantoj legi la kajeron.

la bestoj. Ni venas en la entreprenon. Dekkvarjaraj knaboj alveturigas ĉarojn plenajn de bovidoj – facila laboro! Kiu povas mezuri, kia perfortado necesis por “eduki” dekkvarjarulojn esti rutinismaj murdistoj. Malvarmhumore kaj senskrupule oni ĵetas unu beston post la alia sur la stablon – malgranda bato, kaj la besto skutremas sovaĝe, unu piedon fiksita, sur la stablo, ĝis la buĉisto ĝin ponardas.

Ni turniĝas. Ekstere sur la korto staras granda, majesta okso. Facile oni divenas, kio motivas lin. Kvankam la buĉkonstruaĵo por bovoj ankoraŭ malproksimas, li staras kvazaŭ almasonita kaj ne moviĝas de la loko. Nekutima hororo esprimiĝas en liaj okuloj, kaj kun simpla granda peto en sia rigardo li ĉirkaŭrigardas, ĉu neniu troviĝas por subteni lin en lia turmento. Sed ni ja estas nur gastoj en la buĉejo kaj ni devas subiĝi al la bonaj moroj de nia civilizacio. Al kiu ni turniĝus por savi la mortkondamniton?

Intertempe la pelantoj de la okso malpacientiĝis; unu ĉirkaŭturnas lian voston tiel longe, ĝis la turmentata besto plupaŝas, la alia senpaŭze batas lin per dika klabo sur la flankon, por ke li ekiru direkte al la buĉejo. Ĉu ankoraŭ iu dubas, kiu intereso motivas la okson?

En la buĉejo staras – mem kompatinda viktimo de la ekspluatado – la buĉisto: de supre ĝis sube malpura, glueca, vaporanta je freŝa sango, kaj en lia vizaĝesprimo nenio plu troviĝas krom krudeco, cinikismo kaj sadismo. Vidi lin stari apud la okso kaj eĉ momenton dubi, kiu el ambaŭ – se elekto devus esti farita – meritas la baton sur la frunton, signifas ne havi koron en sia brusto. Tamen, la elekto ne estas nia por fari, kaj ni devas lasi la okson al la destino, kiu nun tuj trafas lin.

Intertempe venis alia buĉisto, pura kaj bone vestita; ni spertos ankoraŭ unu buĉon. Oni altrenas okson kaj per rafinita procedo ruze faligas lin kaj katenas lin al la tero tiel, ke li ne povas moviĝi. Asistanto turnas la gorĝon de la besto supren, kaj per timige certa tranĉo li preskaŭ apartigas la kapon disde la trunko. Sen antaŭa anestezo tiu tranĉo okazas, kaj daŭras preskaŭ dek minutojn, ĝis la morto finfine savas la viktimon. Je la pli alta honoro de Dio ankaŭ ĉi tiu barbariĝo. – La viro en nigra mantelo efikas eĉ pli naŭze ol la senkaŝe malica buĉisto.

Enrigardo en la porko-buĉejon: dek porkoj staras en enfermejo. Unu post la alia oni murdas ilin, dum iliaj kamaradoj devas spekti. Ĉu oni povas elpensi pli grandan agon de krudeco?

Tio, ke en iuj buĉejoj stas eĉ multe pli malbone, oni rekonas ekzemple el oficiala raporto de komisiono, publikigita en la *München-Augsburger Abendzeitung* de 1925-08-09. Kelkaj eltiraĵoj: “Porko, ĵetita en la brogokaldronon, kuris subakve trifoje de unu ekstremo de la kaldrono ĝis la alia, ĝis du buĉistoj kaptis kaj fiksas lin per siaj forkegoj. Tiaĵo okazas laŭ eldiroj de la buĉistoj relative ofte. Unu porkino post la dekdua bato restariĝis sur la antaŭpiedoj. ... Ĉe la ankoraŭ baraktantaj porkoj oni ne malofte kontraŭregule antaŭ la ponardado tranĉas truon en la nazo.” (Oni komprenu bone: temas pri Munkeno, do *kulturloko* de la unua rango.)

Kristnasko, la “festo de amo”, staras antaŭ la pordo. Estas la ĝusta tempo por memori pri la hororigaj naskitaĵoj de la homa fantazio, kiujn oni servigas al si ĉe la grasigo de la “kristnaskaj anseroj”. Oni en laŭvorta senco plenstopas la kompatindajn bestojn per farunbuloj ĝis tia pleneco, ke oni devas ferme ligi iliajn bekojn. Kaj por ke ili ne povu moviĝi, oni enfermas ilin en tre mallarĝajn kaĝojn kaj kelkfoje alnajlas iliajn piedojn tra la naĝmembranoj al la planko. Tiu procedo faras la tiel torturatajn birdojn speciale grasaj kaj tute eksternormale grandigas ilian hepaton. Tiu horora turmento de la anseroj necesas por ebligi al rafinitaj tiel nomataj franduloj la ĝuadon de ansera grashepataĵo.

Ĉu ne estus pli bone nutri la senkulturajn kaj senpensajn “frandulojn” tiel, kiel oni nutras iliajn viktimojn?

Kiu volus elnombri ĉiujn suferojn de la bestoj, kiujn tiuj eltenas pro nura palatotikliĝo de la homoj! Se unu el tiuj malfeliĉaj estaĵoj povus verki historion de la bestoj, tiam la historio de la suferoj de la proletaro aspektus apud ĝi kiel priskribo de ora epoko. Ĉar oni foje rigardu la suferojn de la proletaro. La proleto estas ekspluatata. Sed lia situacio ne estas senespera. Li povas helpi sin mem: li povas serĉi aliancinojn, povas organiziĝi, ekbatalas kontraŭ siaj suferigantoj, havas do perspektivon plibonigi sian situacion. Kaj se li eble ne havas tiun esperon rilate al sia propra persono, do malgraŭ tio li helpas batali kontraŭ la ekspluatistoj, en la sekura konscio, ke lia batalo poste portos fruktojn, kiuj utilis al la homaro. Kaj estas por li bela tasko labori por tio, ĉar li vivas ne nur pro la nura vivo – por li la vivo ne estas la plej alta el ĉiuj valoraĵoj. Ja eĉ tiu proleto, kiun oni tiugrade misuzas, ke oni murdas lin por la celoj de la imperiistoj en la hombuĉejo, sur la “kampo de honoro”, mortas almenaŭ kun la – kvankam erara – imago pri pli alta celo, ĉu defendo de la patrujo, la familio aŭ la “kulturo”.

La buĉbesto, aliflanke, perdas kun sia vivo la plej altan valoraĵon, kiun ĝi posedas, kaj kiel jam dirite, nur pro iu ŝatata kutimo de la homoj. [...]

Ĉu estas tiel, ke ni proletoj alvokas por humana ekspluatado? Aŭ ĉu nia batalo ne direktiĝas kontraŭ la ekspluatado entute? Sed se ĝi direktiĝas kontraŭ la ekspluatado entute, do tiam ni ne rajtas mem ekspluati; male: ĝuste la ekspluatatoj mem plej kapablas empatie senti la turmentojn de la bestoj. Sed se oni vidas tiujn turmentojn – kaj oni vidas ilin, se oni malfermas la okulojn – tiam oni ankaŭ havas devon fini ilin, almenaŭ kiom oni en la momento kapablas fari tion. Kaj la potenco de la unuopulo etendiĝas *almenaŭ* ĝis tio, ke oni mem estu vegetarano, do ke oni siaflanke sin fortenu de la murdado.

Almenaŭ, mi diras; ĉar tio estas verdire tre malmulte. Aŭ kion ni dirus pri “socialisto”, kiu kredas sufiĉe plenumi sian devon kiel socialisto per tio, ke li ne partoprenas en la ekspluatado de la laboristoj. Socialisto ni nomas serioze nur tiun, kiu eniras la batalon kontraŭ la kapitalismo kaj ne kontentiĝas jam per tio, ke li mem ne estas kapitalisto. Oni bildigu al si, antaŭ kiuj taskoj ni staras, kiam ni – kio devus esti simpla ordono de honesteco kaj konsekvenceco – aplikas la saman penslinion al nia rilato al bestomurdado. Kiu ne almenaŭ kredkonfesas ĉi tiun hontige moderan postulon, tiu sciigas per tio, ke li ne vere seriozas pri la forigo de ekspluatado.

Se per tio la demando, ĉu bestoj havas interesojn, nun certe sufiĉe klare estas respondita jese, restas konsiderenda ankoraŭ unu objekto, kiu pro sia ofteco estu ĝisfunde diskutita ĉi tie. Tiu objekto, kiu aperas kun pretendo je pli granda konsekvenceco, pli serioza pripenso aŭ pli bona naturscienca klereco, estis interalie denove eldirita de kritikanto (R.) de mia eseo en *Junge Menschen*, kiu per ĝi volas malhelpi, ke tiu eseo kaŭzu “... en junaj, ankoraŭ ne firmiĝintaj homoj certajn konfuzojn”.

Unue, unu aferon: ĉu la intereso je vivo, ekz. ankaŭ ĉe memmortiganto, estas la ĉefranga? Se ne – kion certe ankaŭ s-ro R. ne dubas – tiam certe klaras, ke oni ĉe neniu vivaĵo povas *dekomenca* scii, kiun intereson ĝi havas, ekzemple ĉu ĝi volas vivi aŭ morti. Do eĉ se mi scius, ke plantoj estas vivaĵoj, mi per tio ankoraŭ nenion scius pri iliaj intereso, ĉar ili sciigas al mi nenion pri tio. Sed mi povas esti devigita respekti nur tiajn interesojn, kiujn mi konas aŭ almenaŭ *povas* koni.

Sed s-ro R. konas la interesojn de la plantoj. Kaj de kie? “Bestoj ... kiel plantoj ... estas ... de la Kreinto ... kreitaj pro siaj propraj intereso.” La “pli alta naturscienca klerecnivelo” de s-ro R. do etendiĝas ĝis interparolado kun la Kreinto. Kaj nia miro pri tiu ĉi klerecnivelo iĝas ankoraŭ pli granda, kiam ni aŭdas de s-ro R. – ankaŭ ion evidente sciigita al li de la Kreinto: “... niaj homaj oreloj ne aŭdas ĝian [*E.*: de la planto] kriadon, kiam oni doloras ĝin, ankaŭ nenion okulon ni povas ekvidi, en kiu la 'nekutima hororo' vidiĝas”.

Sed dum la esplorado de la interesoj de niaj kunvivaĵoj ni ja utiligis nur niajn “homajn” okulojn kaj orelojn, ĉar ni ne disponis la superhomajn de s-ro R. Sed niaj homaj sentumoj sufiĉis al ni por ekkoni tion, ke bestoj havas interesojn. Kaj ke ni devas respekti tiujn, diras al ni nia “homa” justeco-sento.

Sed ni eĉ premisu, ke plantoj havas intereson vivi kaj ke ni vidas la intereson. Kaj ni premisu, ke estas vera, kion s-ro R. elperfidis al ni: “La algo, la planto, la vermo, fiŝo, mamulo kaj homo, ĉio estas vivanta substancevoluo, ... nenio alia ol plasmu vivanta en ameba formo”. Ĉu jam per tio estas dirita, kion s-ro R. evidente volas pruvi al ni ĉi tie, ke oni devas aŭ “libervole, surbaze de ekkonado malsatmorti” aŭ ke “estas certe neeviteble murdi plantojn kaj bestojn”, ĉar “vivantaĵoj nur per vivantaĵoj sin vivteni” povas?

Ĉi tie ni devas rememorigi al ni, ke ni antaŭenigas la vegetaran vivmanieron pro tio, ke ni kontraŭbatalas la ekspluatadon. Sed ekspluatado ne troviĝas jam en la *nura* malrespekto de iu intereso. Se tiel estus, tiam ekspluatado estus *neniam* forigebla el la mondo; alie oni devus premisi staton, en kiu ekzistas *neniuj* sin reciproke kontraŭdirantaj interesoj. Malrespekto de iu intereso iĝas ekspluatado nur per tio, ke oni faras ĝin arbitre – ekzemple kadre de perforto-rilato – sen konsidero pri la interesoj de *ambaŭ flankoj*. Oni do ne bezonas malsatmorti kaj tamen ne bezonas esti ekspluatanto, eĉ tiam, se ni supozus, ke plantoj havas interesojn kaj ni konas ilin. Ni povas nome en tiu kazo pesi la malsamajn interesojn laŭ ilia *pezo* kaj doni preferon al la pli pezantaj interesoj ĉe la intereskontentigo.

Kontraste, ĉe la supozo, ke ĉio, kion vi vidas vivanta, estas “nenio alia ol plasmu vivanta en ameba formo”, ne estas ĝisfine kompreneble, kial oni devus escepti la homon – tiun nur aliforman “vivantan substancevoluon” – de la mortigo, por ke povu “vivantaĵoj nur per vivantaĵoj sin vivteni”. S-ro R. per sia malakcepto de bestaj rajtoj do demonstrus la pravigitecon ankaŭ de kanibalismo (hommanĝado) – konsekvenco de lia pensmaniero, al kiu li kredeble pro tio ne alvenis, ĉar li sub iuj kondiĉoj tiam tro frue devus kontribui mem al la vivteno de “vivantaĵoj nur per vivantaĵoj”. Jes ja, li eĉ ne decidiĝas antaŭenigi la kanibalismon malgraŭ tio, ke oni certe aljuĝus al li la rajton, kiun li afable aljuĝas al la bestoj – kaj strangamane ne postulas por la plantoj – nome, ke ili estu forsenditaj el la mondo “plene sentime kaj sendolore”.

Sed ni ja povas flankenmeti ĉiujn ĉi konsiderojn, en kiuj ni enplektiĝis nur pro s-ro R. kaj lia bona interkonateco kun la Kreinto, kaj reveni al niaj propraj, tamen nur homaj ekkonoj. Tiam ni trovas, ke ĝuste la “alta klerecnivelo” alvenigas “... en junaj, ankoraŭ ne firmiĝintaj homoj certajn konfuzojn”. Kaj ni malkovras, kiom Platono pravis, kiam li en sia *Ŝtato* lasas Sokraton diri jenon: “... tiu elektos prefere tiun por imitado, kiu volas vere rekoni la veron, ol tiun, kiu nur pro plezuro amuziĝas kaj pro ĝuo kontraŭdiradas; kaj tiel li mem kreskos en morala kapablo, kaj ankaŭ ne faros la dialektikan arton (la filozofiadon) misfama, sed pli honorata”.

Ni volas denove honori ĝin, kaj ni do diras: Ni estas socialistoj kaj batalas kontraŭ la ekspluatado. Ekspluatado signifas arbitran malrespekton de interesoj. Plantajn interesojn ni ne konas, do ni ne povas arbitre malrespekti ilin; ni do ankaŭ ne povas ekspluati plantojn. Bestajn interesojn ni konas; ni povas do ekspluati bestojn, kaj ni faras tion, kiam ni nutras nin per ilia karno, dum plantoj en sufiĉo troviĝas. Tiel longe kiel ni mem ekspluatas, ni per tio malmeritas la rajton postuli de aliaj, ke ili ne ekspluatu nin. Ni do ĉesas per tio esti socialistoj.

Kiu honeste trapensas la postulon pri senekspluata socio ĝis la fino, iĝas vegetarano.

[trad. de G. Mickle, 2018-07]